



KURDA JUNULARO

"Superba estis la hieraŭa okazintaĵo!" diris al mi antaŭhieraŭ(*) Niga Salam. Tiu 21-jara artistino ĉeestas artstaĝon en Bilbo ekde la komenco de februaro kune kun Azar Othman, kaj ili rehejmiĝos venontan ĵaŭdon. Ili estas ekzemplo de la juna generacio de Suda Kurdio(1); speciale Niga, kies ĉiuj memoraĵoj estas el libera Kurdio. Tial ili kunportis artismajn proponojn tre malsamajn rilate tiujn de iliaj antaŭantoj, kiuj kultivis la patriotismon, la rezistadon kaj la sinoferon, demandante, interpelaciante, serĉante diferencojn; ĉu pri la rolo de la ino, ĉu pri la GLAT-kolektivo(2), aŭ kiel kaj kial ŝi, post okjara vestado demetis la en la adolesto truditan kaptukon. Ŝi verkis ankaŭ alian artaĵon pri enprizonigitaj virinoj. Tagon post kiam Azar kaj Niga revenos hejmen, la 16-an de marto, oni memoros la 30-an datrevenon de la ĥemia bombado fare de Saddam Hussein, kaj oni omaĝos la 5000 civilulojn murditajn en Helebĝo(3).

Kiel kutime al tiu ĉi generacio, kiu alrigardas la estontecon liberigita el la katenoj de la pasinteco, mi nature parolis angle kun Niga. Post la kurda, ĝi estas ŝia dua lingvo, "mi iom komprenas la araban, sed malmulton, kaj ne scias ĝin paroli", ŝi diris. Ŝi apartenas al la generacio, kiu kreskis en kurda ŝtato ne sendependa, sed ja tute suverena, senkonekta disde Bagdado. Ĝi ricevis kurdlingvan edukon, kaj la angla fariĝis ĝia dua lingvo, kiel kutime okazas dum lingva normaligado: Unue estas la propra lingvo, poste la internacia, kaj tiu, kiu ĝis nun estis la ŝtata hegemonia lingvo, perdas sian hegemoniecon, postrestas kaj, nepre, fremdiĝas por la novaj generacioj. Tio estas perdi heredaĵon, kiel ni komentis pasintsemajne rilate la estonan kaj la rusan, sed ankaŭ estas paŝo por povi vivi en la propra lingvo. Flanka malĝoja detalo: en la artgalerio Errekalde, la interpelacioj al la publiko rilate la instalaĵoj de ambaŭ artistoj estis skribitaj nur en la hispana kaj la angla.

Azar Othman kunportis vitran skribtabulon kun la demando "Kion vi atendas?" kaj ĝin lokis surstrate por projekcii interne de la galerio la respondojn de la preterpasantoj. En okcidento, li diris, oni respondas pri ĉiutagaj aferoj ("Mi atendas la manĝhoron" aŭ "la tempon por la kafo"), kaj en Kurdio pli profunde, ĉiam konsiderante politikajn aferojn, kaj ambaŭ komunikadoj estas, kio interesas lin. Sed li agnoskis, ke li estis trovinta strangan ligan inter Bilbo kaj Silemajno(4): la eŭskoj, same kiel la kurdoj, vortumas pri la sendependeco de sia lando.



Niga Salam. *Virino*.

Ekde kelkaj monatoj, la kurdoj de Irako suferas blokadon flanke de Bagdado, kiel respondo al ilia sendependec-deziro. Sed iel ajn Azar kaj Niga estas feliĉaj. Ĉar ili havas la eblecon fari paŝon antaŭen disde la epikŝablono de la gepatra generacio, sed ankaŭ kompare al la ceteraj kurdoj: Niga nepre memorigis al mi la kazon de la artisto kaj ĵurnalista Zehra Dogan. Ankaŭ en marto ŝi havas datrevenon: ŝi estis enkarcerigita la 24-an de marto 2017 pro pentraĵo, kiu reprezentis urbon detruitan fare de la armeo. Ekspozicio pri ŝia verko trairas Eŭropon, kaj eblas, ke ĝi alvenos en iun eŭskan artgalerion. Streboj ne mankas, ja la Dogan-afero trovis grandan eĥon internacie. En alia pentraĵo ŝi kaptis la momenton, kiam, en Roĵavo, venkinte la ĝihadistojn oni demetis la nigrajn tukojn kaj surmetis kolorajn robojn.

La malpuran laboron, kiun en la mondo neniu volis fari, plenumis la sinofero de centoj da junuloj, kiuj haltigis la tiel nomatan Islaman Ŝtaton. Poste, tiu sama Turkio, kiu enkarcerigas artistojn, batis kontraŭ la gerilanoj, kiuj venkis la ĝihadismon en Sirio, tiel, kiel ĝi estas nun faranta en Afrino. Superba estis la ĵaŭda okazintaĵo, ĝis disvastigi la bildon de Bilbo en la tutan mondon. Sed la 9-an de marto la prezidento de Turkio, Recep Tayyip Erdogan, avertis, ke oni pretas sturmi la urbon Afrinon. La plej kuraĝaj knabinoj kaj virinoj de Mezoriento ĝin defendos ankaŭ nun, kontraŭ la dua plej granda armeo de NATO, dum Usono deturnas la rigardon, Germanio vendas armilojn al Ankaro kaj Moskvo faras obskurajn negocojn kaj paktojn. Dume, la 3000 infanoj kaj virinoj forkaptitaj en Ŝengalo(5) dum la genocido kontraŭ la jazidoj en aŭgusto de 2014 ankoraŭ restas en la manoj de la ĝihadistoj aŭ estas malaperigitaj.



Niga Salam. *Trovu la diferencon.*

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj)

- (1) Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.
- (2) Gejoj, Lesboj, Ambaŭseksemuloj kaj Transseksuloj.
- (3) Helebce (Halabja, en la araba).
- (4) Silemanî.
- (5) Shingal.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Urtzi Urrutikoetxea.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 11-an de Marto 2018-a.

Tradukis: NXC. Aprilo 2018-a. Provlegis: DS.



La pentraĵo de Zehra Dogan, pro kiu ŝi estis enkarcerigita. Supre la fotografiaĵo de la turka armeo, kiu servis kiel modelo.